

FERVOJA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO

Organo de INTERNACIA ASOCIO DE LA ESPERANTISTAJ FERVOJISTOJ

Jara abono : S 1. Unu N° : S 0,2	<p>REDAKCIO</p> <p>S-roj Berlande kaj G. Chilot Administrantaj Redaktoroj</p> <p>Sekretario: S-ro Alfred Petzold Königstrasse, 4 III, Leipzig (Germanujo)</p> <p>Prezidanto : S-ro P. Tarnow Perlebergerstr. 9 I, Berlin-Potsdam.</p>	<p>Ciujn manuskriptojn, abonmendojn, anoncojn, k.t.p., adresu al S-ro BERLANDE aŭ al S-ro GEORGE CHILOT, ambaŭ en <i>Ville-neuve-St-Georges (Francujo)</i>.</p> <p>La redakcio rezervas al si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn. — Artikolojn ne akceptitajn oni ne povas resendi.</p>
---	--	---

NOVAJ ABONANTOJ

Franciskus Jacobus Lindsen, ĉefkonduktoro, Nederlanda Ŝtatfervojo, Paul Krugerstrato, 109^b, Rotterdam (Holando).

Roelof Tinga, ĉefkonduktoro, Nederlanda Ŝtatfervojo, Paul Krugerstrato, 97 II, Rotterdam (Holando).

La membrokartoj estas sendotaj de S-ro Petzold, al kiu S-ro George Chilot sendis ilin de Stutgarto.

Atentu ! Erare ni anoncis, ke S-ro Josiĉ, ĉe Koluski (Ruslando) estis aboninto. Lia nomo estas forstrekota ĉe la nomaro de la 9-a F. E.

AL LA LEGANTOJ

« Fervoja Esperantisto » aperas nun sufiĉe regule, plie ĝi sukcesis havi unu anoncon kaj abonintojn ne fervojistojn, sed kompreneble estas absolute necesa, ke oni helpu ĝin, kiel eble plej, eksterasociigante ĝin, tial ke la Redakcio prenas sur sin gravan ŝarĝon !

Se la sukceso alvenos, I. A. E. F. venkos, ĉar F. E. ĝin helpos ; plie, se la ĵurnalo bezonas la Asocion por vivi, same la Asocio bezonas la ĵurnalon por kreski.

Financa stato inter I. A. E. F. kaj F. E.

I. A. E. F. kalkulas :

31 anojn kun S-roj Kurt kaj Hock ;

33 anojn kun S-roj Petzold kaj Engst.

« Fervoja Esperantisto » sendis al I. A. E. F. :

30-a de Decembro, kvitanco	1 . . .	8 fr. 68
31-a de Januaro,	» 12 . . .	9 fr. 49
13-a de Majo	» 37 . . .	7 fr. 07

Sumoj senditaj al I. A. E. F. de
S-roj Kurt kaj Hock: 4 fr. 27 × 2 . . . 8 fr. 54

Abonprezoj rekte enkasitaj de I. A.
E. F. kaj ne senditaj al F. E.: S-roj Petzold
kaj Engst: 2 fr. 50 × 2 5 fr. 00

38 fr. 78 = 15 Sm. 32

38.78 : 1.25 = 31 anojn F. E. kvitancas kontraŭ I. A. E. F.

LA KONGRESOJ

Estus kiel eble plej necese, ke ni propagandu por I. A. E. F. kaj por tio ni ne devas maltrafi okazon ia ajn. Ĉiam kaj en ĉiuj landoj okazas kongresoj : federaciaj, naciaj, k. t. p., ni utiligu tiujn kongresojn por starigi specialan kunveneton aŭ simplan rendezuon por fervojistoj. — Ĉe la angla kongreso en Eastbourne franca kolego ĉeestis (S-ro Givord), eble ankaŭ aliaj anglaj kolegoj, sed pro manko de speciala faka kuveneto li revenis hejmen sen esti vidinta alian fervojiston.

Ofte ni povus vojaĝi al tutmondaj kongresoj sed pro deĵoro ni povas nur havi unu aŭ du libertempajn tagojn, interligitaj kun la unua aŭ lasta dimanĉo de la kongresa semajno ; tiaj tagoj sufiĉus por konatiĝi kum fremdaj kolegoj pli feliĉaj pri libertempo ; kompreneble tiu, kiu vojaĝas al kongreso nur unu tagon, ne volas elspezi dek aŭ dek kvin frankojn por la kongresa karto.

Estus do necese, ke apud la Berna Kongreso, ĉu lunde aŭ sabate oni organizu specialan kunveneton aŭ rendezuon, kie la

fervojistoj povus ĉeesti por diskuti kaj pritrakti pri I. A. E. F. kaj interkonatiĝi. Ĉu ne?

Pri tio, skribu al S-ro Berlande.

Genta Esperanto-Semajno. — Kiel provo de nia supra propono, oni estus povinta starigi specialan kunvenon por fervojistoj, sed bedaŭrinde, malgraŭ niaj klopodoj, ni ne ankoraŭ sukcesis trovi Belgan kolegon Esperantistan por ĝin organizi.

La bavara fervojara administraro kaj la unuiĝo de la sudgermana fervoj- kaj poŝtpersonaro ⁽¹⁾.

La bavara fervojara administraro tre baldaŭ eldonos novajn instrukciojn pri la akcepto en la deĵoron de la bavara fervojaro. Tiu parto de la instrukcioj, kiu rilatas al la demando pri samtempa striko ŝajnas esti gravega. Ĉi tiu instrukcio havos jenan enhavon :

« Oni devas postuli, ke la personaro de la fervojaro senkondiĉe rezignu pri samtempa striko rilate al laboro aŭ deĵoro pro la intereso de la ŝtato kaj deĵoro. Oni ne povas permesi, ke la personaro apartenu al unuiĝoj, kies konduto ne povas garantii, ke ili ne uzos la ilon de tia striko rilate al laboro aŭ deĵoro en la regiono de la fervojara administraro. »

La « Bavara ŝtata gazeto » por tio skribas : « Laŭ la ordonoj ekzekutaj la laboristoj akceptotaj en la deĵoron devas certigi per subskribo, ke ili sciigis pri ĉi tiu ordono kaj estas informitaj, ke nuntempe laŭ ĉi tiu ordono precipe la liberaj asocioj de la metal- kaj transportlaboristoj same kiel la unuiĝo de la sudgermana fervoj- kaj poŝtpersonaro estas en la nombro de la malpermesitaj unuiĝoj ; plue ili devas certigi, ke la administraro kaŭze de la kontraŭagado rilate al ĉi tiu ordono estos rajtigita pripensi la eksigon de tia laboristo. Ĉi tiu ordono rilatas antaŭ ĉio la novajn akceptotajn laboristojn. — Estas sendube, ke la liberaj asocioj postulas por si la rajton de striko. La reĝa fervojara ministro pruvis en la debatoj de la popolkonsiliĝo (Landtag) la 11-an kaj 24-an de Oktobro 1912 *unue*,

(1) Ĉi tiu unuiĝo celas kaj favoras socialismajn ideojn.

ke klopodoj sin faras rimarkeblaj en la unuiĝo de la sudgermana fervoj- kaj poŝtpersonaro, kiuj povas kaŭzi la eblecon de striko en la regiono de la fervojara administraro, *plue*, ke ne nur granda nombroj de lokaj unuiĝoj de la asocio de la sudgermana fervoj- kaj poŝtpersonaro aliĝis al la lokaj karteloj de la liberaj asocioj, sed ke la unuiĝo apartenas ankaŭ al la ĝenerala federacio por transportlaboristoj. Ambaŭ atributoj estis ankaŭ precipe rimarkigitaj en la numero 21-a de « Weckruf » de 19-a Oktobro 1912, organo de la fervojista sekcio de la unuiĝo por germanaj transportlaboristoj, kiu estas nomita en la gazeto de la fervoj- kaj poŝtpersonaro « frata organo ». Krom tio en « Weckruf » estas rimarkigite, ke la unuiĝo de la sudgermana forvoj- kaj poŝtpersonaro postulas de longtempe por la fervojaj laboristoj la senlimigitan rajton de kuniĝo, do ankaŭ la rajton de striko. »

« Pro ĉi tiuj faktoj oni ne povas atribui decidigan signifon al la deklaro farita de la estraro de la unuiĝo la 24-an de Septembro 1912, kiu konsideras la strikon neleĝe permesita ilo por plibonigi la situacion de la laboristoj kaj oficistoj en la regiono de la fervojara administraro. La atesto de la estraro, ke la § 152 de la ŝtata metia programo ne asistas la anojn de la fervojara administraro rilate al postulo de rajto samtempe striki ne signifas ankoraŭ faktan rezignon pri la striko. Krom tio estas ankaŭ konsiderinde, ke ankoraŭ nun anoj de la partio socialisma apartenas al la estraro de la unuiĝo, kiuj klare postulas la rajton de samtempa striko por la anoj de la fervojaro. — Ĉar la reĝa ŝtata registaro de longtempe sensukcese atendis ĉu decidiga ŝanĝo okazos pri la konduto de la unuiĝo, ĝi nun estas devigita al la procedo komence klarigita.

HANS REUSS, supera termezuristo.

GRAND HOTEL DU GLOBE

71, rue Monge, Paris

Proksime Jardin-des-Plantes, Sorbonne, Jardin du Luxembourg kaj Presa Esp. Societo.

A. LECLERC, posedanto.

Hotelo rekomendinda al Esperantistoj.

MODERNA KOMFORTO. — BONA SERVADO. — MODERAJ PREZOJ.

— Esperanto parolata. —

Centra Presejo Esperantista, V. Polgar, 33, rue Lacépède, Paris.

Le gérant : A. BERLANDE.